

Eŭropa Bulteno

Julio-Aŭgusto 2012, Numero 118

LA 9-A KONGRESO DE EEU OKAZIS EN GALIVO, IRLANDO

La unuan fojon EEU organizis kongreson sen havi klasikan Lokan Kongresan Komitaton kiu kutime konsistas el lokaj esperantistoj. Simple en la irlanda urbo Galivo ne ekzistas Esperanto-Societo kaj ankaŭ ne lokaj esperantistoj. Ĉar nia prezidanto havis bonajn kontaktojn en la urba administracio, la urbo invitis la kongreson kaj ni decidis organizi la kongreson mem kun la helpo de loka entrepreno por organizado de diversaj kulturaj kaj aliaj aranĝoj: BEM. Tial la efektiva teamo kiu organizis ĉion estis Maja Tišljar nome de EEU kaj Alan Behan nome de BEM. Kompreneble en la antaŭpreparoj gravajn laborojn faris ankaŭ la prezidanto Seán Ó Riain mi kaj Flory Witdoeck.



Tiusence la kongreso tre bone, glate kaj senprobleme efektiviĝis. La nura seniluziiĝo, kiun ni havis, estis la rekorde malgranda nombro da partoprenantoj: Nur 157 personoj, sed el kontentige multaj landoj – 28 landoj ĉefe de Eŭropo, sed ni havis partoprenantojn ankaŭ el Brazilo, Kubo, Japanio kaj Usono.



Aparte ĝojigis nin la fakto ke el Irlando partoprenis pli da kongresanoj ol ni supozis, entute 10, kio estas sendube rekorda nombro da irlandanoj iam ajn venintaj al EEU-kongresoj.

La centra kongresa programo estis la konferenco pri la ĉeftemo: Lingvolernado en EU: lerni pli, kosti malpli, kadre de kiu ni havis dekunu prelegojn de fakuloj kiuj estis

kontentige vizitataj kaj pridiskutataj. Jen la prelegantoj kun la preleĝtitoloj:

1. Michele Gazzola (Germanio/Italio): Lingvaj politikoj kaj ekonomiko: aliroj kaj rezultoj
2. Angela Tellier (Britio): Survoje al plurlingveco pere de Esperanto: lastatempaj studoj en anglaj bazlernejoj
3. Renato Corsetti (Italio): Teoriaj bazoj de instruprojektoj kun Esperanto
4. Seán O Cuirreáin (irlanda komisiito pri lingvoj): Lingvoj en Irlando kaj la laboro de komisiito pri lingvoj
5. Wim Jansen (Nederlando): La lernebleco de Esperanto
6. Tim Morley (Britio): Springboard to languages: vidpunkto el la klasĉambro
7. Nollaig Ó Muraíle (Irlando): La lingvoj kiujn oni parolas en Irlando
8. Nikola Rašić (Nederlando): Lingva situacio de Romaoj en EU
9. Zlatko Tišljár (Slovenio/Kroatio): Propedeŭtika eksperimento en Slovenio-Aŭstrio-Kroatio de 1993-1995
10. Seán Ó Riain (Irlando): La lernado de irlanda lingvo: ĉu helpe de Esperanto?
11. Eugene McKendry (Nordirlando – UK): Superrigardo de la instruado de Lingvoj en Norda Irlando

Akcentindas ke 3 el la irlandaj prelegantoj estis irlandaj kaj nordirlanda fakuloj neesperantistoj inter kiuj du eĉ legis siajn referaĵojn en Esperanto.



La kongreson aŭspiciis la ŝtatprezidanto de Irlanda Respubliko Michael D. Higgins kaj al la kongreso estis senditaj salutmesaĝoj kaj de la prezidanto Higgins kaj de la ministrino pri Eŭropaj Aferoj de Irlando Luncinda Craghton, kies tekstojn ni aparte aperigas.

La kongreson malfermis la urbestro de Galivo, sinjorino Terry O Flaherty kaj dum la malfermo estis solene transdonita premio Cigno por la plej sukcesa landa asocio en EU rilate pripublikan informadon al Esperanto-Asocio de Britio.

Estis deko da aliaj kongresaj eroj kiel Irlanda eksprese, prelego pri irlanda historio, legado de prelego de Etsuo Miyoshi, prelegoj pri Triesta konferenco kaj Jaro de Tibor Sekelj, pri TEJO-

agado, kunvenoj de TEĴA kaj Juristoj kaj kompreneble la du kunvenoj de la asembleo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Ĉiuvespere estis reprezenta kultura programo:

- Nacia vespero de irlanda muziko kaj dancoj plenumitaj de fama irlanda kantisto Seosamh O'Flaithearta kiun sur piano akompanis Tom Cullivan, irlanda kantisto Don Stiffe kune kun perkusionisto Jim Higgins, violonistoj Yvonne Flynn kaj Ronan Flaherty kaj akordeonisto Conor McCarthy. Kadre de la muzikvespero estis prezentitaj dancoj de elstaraj junaj gedancistoj Emma O'Sullivan dancanta malnovtipan irlandan solo-dancon sean-nós kaj mondĉampionoj pri irlanda danco Claire Greaney kaj Cathal Keaney.
- Du teatraj vesperoj: Kabaredprogramo de Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik „Kompleta (preskaŭ) historio de Universalaj kongresoj“ kaj teatraĵo de Georgo Handzlik „Ludoviko Lazaro“,
- Komuna muzikkoncenrto de Georgo Handzlik kaj JOMO.

Fine, ankaŭ la ekskursiva programo abundis, kiu ja allogis multajn kongresanojn: Okazis tritaga antaŭkongreso en Dublino kiun partoprenis trideko da personoj, dutaga postkongreso al la Aran insuloj kun dudeko da partoprenantoj. Dumkongrese eblis partopreni en duontagaj ekskursoj al Galivo mem kaj al la regiono Burren sude de Galivo kun vizito de kastelo en Kinvara, Poul nabrone dolmeno kaj belaj ŝtonaj pejzaĝoj.



La estraro de EEU havis kunsidon en kiu la plej grava decido estis elekto de la urbo por sekva jubilea 10-a kongreso. Ĝi okazos en somero (verŝajne julio) de 2014 en slovakia urbo Nitra (90 km for de la ĉefurbo Bratislava), de kies urbestro EEU ricevis oficialan kandidatiĝleteron.

Sendube la plej impresa valoro de la kongreso estis la

konferencaj prelegoj kies tuto celis montri unuflanke la propedeŭtikan valoron de Esperanto en instruado de aliaj fremdlingvoj kaj aliflanke la problemojn pri instruado de fremdlingvoj en Eŭropo, aparte pri la instruado de la irlanda. La prelegoj estis ege valoraj kaj lumigis la problemon el pluraj aspektoj. La 4 prelegoj pri la situacio en Irlando kaj Nordirlando montris la problemon, kiu ĉefe prezentiĝas en tio ke la plurjarcenta regado de britoj en Irlando kaŭzis ke la elitoj de la irlanda popolo ekmalestimis la propran lingvon kaj kulturon kaj tial la tuta popolo ĉefe dum la periodo de la granda malsato ekkredis la irlandecan kaj la irlandan lingvon malinda kaj senvalora kaj amase ĝin ne volis plu uzi, eĉ malpersmesis al la propraj infanoj. Pro tio ĉefe dum la dua duono de la 19-a jarcento la irlanda lingvo kaj konscio pri irlandeco estis detruitaj. La tuta 20-a jarcento ne sufiĉis por korekti la mison. Tial ka kongresa konferenco kondukis ĉefe al du konkludoj: Esperanto povus grave helpi la pli efikan lernadon de la irlanda en irlandaj lernejoj, se oni instruus unue en lernejoj unujaran propedeŭtike gravan parton de Esperanto kiel katalizilon post kiu la sukceso en la irlanda estus multe pli bona post sekvaj du jaroj ol estas nun post trijara lernado. La dua konkludo estis ke la sama procedo, kiun irlandanoj travivis ĉefe en la 19-a jarcento, la procedo pri malfortigo de la

konscioj pri la naciaj lingvoj en granda plimulto de eŭropaj nacioj okazas nun pro la edukpremo de la usonangla kulturo, kiu daŭre influas al la popoloj per la mesaĝo: viaj lingvoj kaj kulturoj ne havas perspektivon: la fina venkanto kaj la nura valora kulturo kaj lingvo estas la usonangla.

Pro tio la kongresaj konkludoj akceptitaj de ĉiuj kongresanoj kun unu sindetena voĉo estas la jena:

La 9-a Kongreso de EEU en Galivo, Irlando, kun 157 partoprenantoj el 28 landoj, okazinta de la 16-a ĝis la 20-a de Julio 2012, kies temo estis “Lingvolernado en EU: lerni pli, kosti malpli”:

1. rekomendas ke la irlanda prezidanteco de la Konsilio de EU 2013 aldonu “multlingvismon” al siaj prioritatoj,
2. proponas ke la EU-Konferenco pri multlingvismo en Kipro de la 26-a ĝis la 29-a de septembro 2012 rekomendu ke ĉiuj EU-membroŝtatoj donu seriozan konsideron al la rekomendoj de la Civilsocia Platformo por Multlingvismo, 2011.
3. aldone proponas ke la kipra konferenco diskutu kiel praktike progresigi la unuan rekomendon de la Civilsocia Platformo en la sekcio pri edukado, nome, la dezirindecon de pilotprogramoj en la bazlernejoj de pluraj EU-membroŝtatoj por ekscii kiu 2-a lernata lingvo plej multe kuraĝigas la lernadon de 3-a lingvo, cele al plenumo de la oficiala lingvopolitiko de EU, decidita fare de la Eŭropa Konsilio en Barcelona en 2002, kaj subtenata de 72% de EU-civitanoj laŭ Eurobarometro 2011, ke ĉiu EU-civitano lernu 3 lingvojn, la denaskan kaj 2 aliajn,
4. konsideras ke la brita programo “Springboard to Languages” (www.springboard2languages.org) povus plibonigi kaj plirapidigi la lernadon de la irlanda lingvo kaj la lingvolernadon ĝenerale, kaj do rekomendas al la irlandaj lernejoj instancoj fari pilotprogramon baze de “Springboard to Languages” por testi ĉu tiu aliro estas efika en irlandaj cirkonstancoj.



Fine raportindas ankaŭ ke la Asembleo de EEU kiel ĉefdecidorgano havis du sukcesajn kunsidojn kaj akceptis la financon kaj laborraportojn kaj la planojn por la agado de EEU en 2012 kaj 2013. Okazis ankaŭ vastaj klarigoj de la agado de EEU rilate la eŭropan popoliniciaton pri teksto de

Eŭropa himno kaj pri la agado de EEU en Multlingvisma Platformo de neregistaraj organizaĵoj starigita de Eŭropa Komisiono.

Zlatko Tišljarić

MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE IRLANDO



Is mór an chúis áthais dom fíorchaoín fáilte chun na hÉireann agus chun na Gaillimhe a fhearadh ar na toscairí atá tagtha chuig comhdháil Esperanto na hEorpa. Tá súil agam go mbainfidh sibh taitneamh as bhur dtréimhse in Éirinn agus go n-éireoidh go geal le bhur gcomhdháil.

Kiel mi supre skribis en nia nacia lingvo, la irlandano, estas por mi granda plezuro bonvenigi la 9an Kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio al Irlando kaj al Galivo, la ‘dulingva ĉefurbo de Irlando’. Mi esperas ke plaĉos al vi via restado en Irlando kaj ke bone sukcesos via kongreso.

Dum la 125 jaroj de ĝia ekzisto, Esperanto iĝis eta sed rimarkinda parto de nia komuna eŭropa kultura heredaĵo. Kiam D-ro Ludoviko Zamenhof lanĉis sian novan lingvon en Varsovio en 1887, li apenaŭ povus imagi ties sekvan historion: malrapide altirante al si komunumon de regulaj uzantoj en pli ol 120 landoj; produktado de riĉa literaturo, kaj origina kaj tradukita; penoj akceptigi ĝin en la Ligo de Nacioj en la jaroj 1920-aj; subpremado fare de totalismaj reĝimoj, aparte en Germanio kaj Sovetunio dum la jaroj 1930-aj. Sed li estus feliĉa pro la modesta sukceso de sia lingvo, kiu nun havas fluajn parolantojn en la plejmulto de landoj de la mondo.

La Esperanto-movado neniam posedis amasan sekvantaron en Irlando, sed ĝi ja havis subtenantojn kiujn konas ĉiu irlandano: du el la viroj kiuj subskribis la proklamon de irlandano respubliko komence de la ribelo en 1916, kaj kiuj estis poste mortpafitaj, James Connolly kaj Joseph Mary Plunkett, estis studentaj Esperanton, kaj subtenis ĝian mesaĝon de internacia paco kaj amikeco surbaze de egaleco. En la mondo, kie konflikto estas ankoraŭ tro ofta, tiu mesaĝo de paco surbaze de samniveleco de respekto restas tiom grava kiom ĝi estis por restarigi pacon en nia propra lando.

Mi deziras al ĉiuj partoprenantoj fruktodonan konferencon kaj ĝuindan restadon en Galivo.

Micheál D. Ó hUiginn
Uachtarán na hÉireann (Prezidanto de Irlando)

NIAJ LANDAJ ASOCIOJ LA ESPERANTISTA MOVADO EN GREKUJO




La greka esperantista movado aperis nur kelkajn jarojn post la apero de Esperanto mem.

En Ateno, en 1904, la unua aktiviĝis d-ro Emanuil Dragumis, kiu post propono de Zamenhof mem iĝis membro de la Lingva Komitato, fondita dum la 1a Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer.

En 1906, en Samoso, la greka insulo, tiama aŭtonoma

regiono estanta sub turka hegemonio, d-ro Anakreon Stamatiadis starigis kaj organizis la Samosan Esperantistan Societon. Tiu Societo estis la unua greka E-asocio kaj la unua verko de A. Stamatiadis, kiu, poligloto, persono perfekte edukita en famaj francaj universitatoj pri diversaj scienc-fakoj, estis tiam eminenta medicindoktoro, nomumita ĉefkuracisto de la princolando kaj ĝenerala direktoro de ties Centra Hospitalo.

La organizita en Samoso movado, malgraŭ la unuaj malfacilaĵoj, iom-post-iome plifortiĝis. En 1909 estis eldonita la unua greka E-revuo, la “Greklingva Esperantisto”, oficiala organo de la Samosa Esperantista Societo, kiu estis senpage presita, zorge de la princolanda presejo. D-ro Stamatiadis, kiel familia kuracisto kaj intima amiko de la princo-reganto de Samoso influis lin tiel, ke la 8-an de Oktobro 1910, estis deklarita la princa decido, laŭ kiu Esperanto estis oficiale enkondukita en la studprogramo de la duagrada edukado de la lando, kiel **devige instruata leciono**. Tio estis kaj estas ĝis nun unika atingo, do Grekujo estas la unua kaj la sola lando, en kiu estis laŭ ŝtata decido instruata Esperanto, en la publikaj lernejoj. Dume, en la cetera lando unuopaj esperantistoj en diversaj urboj aktiviĝis kaj organizis grupojn, koteriojn, kursojn de Esperanto.



En Grekujo, la unua libro en Esperanto estis eldonita en 1907. Temis pri la “Fundamento de Esperanto” de L. L. Zamenhof, tradukita en la grekan. Sekvis, en 1908, instrulibro kun elementa dulingva vortaro, ankaŭ traduko de franca instrulibro. La unuan vere grekan instrulibron de Esperanto verkis kaj eldonis A. Stamatiadis.

Post la unua mond-milito, en 1920, A. Stamatiadis kun aliaj grekaj esperantistoj loĝantaj en Konstantinopolo, fondis en tiu granda urbo de Turkujo grek-esperantistan asocion kun la nomo “Konstantinopola Esperanto-Asocio, BIZANTIO”. La unua klopodo por la starigo de E-asocio en Ateno ne estis sukcesa. Estis fondita (19/3/1924) la asocio “Novhelena Esperanto-Societo”, kiu tamen malaperis post nelonge.

En 1925 estis eldonita en Samoso nova revuo, nomita “Samosa Esperantisto”. Unu jaron pli poste A. Stamatiadis transloĝiĝis en Ateno, kie li kolektis, kunvenigis kaj organizis la disajn atenajn esperantistojn, kun kiuj li fondis (1926) Helenan Esperanto-Asocion, la centran, vivantan ĝis nun esperantistan organizon de Grekujo, ekde la komenco membro de U.E.A. kiel la Landa Asocio de Grekujo. En 1927 estis fondita en Ateno alt-nivela Societo, celanta la kunordigadon de la instruprogramoj, surbaze de la zamenhofaj indikoj, kun la nomo “Helena Esperanto-Akademio”, kiu pli poste estis ŝanĝita en “Helena Esperanto-Instituto”

En 1929 aperis en Ateno la organo de Helena Esperanto-Asocio, la periodaĵo “La Internacia Lingvo”, kiu estis eldonata ĝis la fino de 1936. Tuj poste aperis la dumonata revuo “Helena Esperantisto”, kiu estis eldonata ĝis la fino de 1952.

Post la starigo de Helena Esperanto-Instituto kaj en la kadro de la funkciado de Helena Esperanto-Asocio estis fonditaj en Ateno la “Atena Studenta Esperanto-Grupo” (1928), kaj pli poste la “Helena Virina Esperanto-Grupo”, organizoj kun ne longa vivdaŭro. En la daŭro de la lasta jardeko antaŭ la dua mond-milito, la esperantista movado en Grekujo floris.

nivelan 40-membran gean ĥoron, kiu partoprenis multajn, publikajn, solenajn, ĥor-prezentadojn, en kiuj ĝi kantis en Esperanto. Lasta revuo de Helena Esperanto-Asocio estis la dumonata “Nia Verda Informilo”, kiu aperis de 1978 ĝis 1980.



Ĝis 1987 la instuado de la lingvo en la asociaj kursoj estis farita helpe de la malnovaj lernolibroj verkitaj de A. Stamatiadis: “Gramatiko, Ekzercaro, Historio kun Vortaretoj Esperanta-Greka kaj Greka-Esperanta”, “Elementoj de la Internacia Lingvo Esperanto kun Vortaro Esperanta-Helena”, “Gramatiko kaj Ekzercaro de la Internacia Lingvo Esperanto”, “Nova Gramatika Libro”, “Vortaro Helena-Esperanta kun radikaro Esperanta-Helena”. Temis pri bonegaj lernolibroj, tamen bazitaj en tre malnova, ne plu alloga instrumentado. En 1987 aperis la nova, moderna, granda

(672paĝa) lernolibro “La Internacia Lingvo Esperanto - metodo de instuado-meminstruado”, de Spiros Sarafian. Temas pri helpilo precipe utila laŭ tio, ke ĝi povas esti uzata de memlernantoj. Multe pli poste, en 2008, estis eldonita plena, tre granda (3-voluma, 1642-paĝa) Greka-Esperanta Vortaro kaj same plena unuvoluma Esperanta-Greka Vortaro, de la sama verkisto.

En 1996 aperis eble la plej impona en la mondo libro pri Esperanto. Temas pri la greklingva, 786-paĝa, verko de Kostas Kiriakos “Esperanto, la lingvo de la Espero”, kiu enhavas kaj pritraktas la tuton de Esperanto, la strukturon de la lingvo, la detalan historion, la evoluon kaj atingojn de la esperantistaro en la daŭro de la unuaj cent jaroj, la internacian E-movadon, la ideologion, ĉion koncernantan la grandan aferon de Esperanto.

La komenco de la 21a jarcento trovis Grekujon en stato necerta, duba, ne tute stabila laŭ la ekonomio kaj la noveŭropa orientiĝo. La longa, tre multekosta preparado de la Olimpiaj Ludoj de 2004 kaj la eniĝo de la lando en la eŭropan zonan de la komuna monunuo, la teruraj, katastrofaj politikaj militaj eventoj en proksimaj mondpartoj, eĉ en la balkana najbaraĵo, iom-post-iome ŝanĝis negative la ekvilibron, skuis ĝis dekadenco multon, ankaŭ la grekan E-movadon, kiu grade komencis malfortiĝi. Multaj monsubtenantoj, volontuloj, aktivuloj baldaŭ perdiĝis, la luksa asocia klubejo estis anstataŭita de modera duĉambra oficejo, la ĉiaspecaj aranĝoj ne plu estis eblaj. En tiaj cirkonstancoj, la grekaj esperantistoj ne estis ankoraŭ pretaj sekvi kaj partopreni la rapidan invadon de la tutmonda esperantistaro en la interreton. La unuaj paŝoj en tiu ĉi kampo estis faritaj per la eldono de monata Elektronika Informilo pri la Esperanta Movado, nomita “Esperantujo”. La apero de tiu periodaĵo, en preskaŭ 3000 adresoj, daŭris ses jarojn (2002-2007), ĝis la neatendita, subita forpaso de ties kreinto kaj prizorganto Aleksandros Fragias.

Malgraŭ la negativaj cirkonstancoj de la kriza periodo, en la jaro 2006 estis eldonitaj gravaj, tre interesaj verkoj, nome la granda “Historio de Herodoto” kaj tri filozofiaj verkoj de

Platono, “La Apologio de Sokrato”, “Kritono” kaj “Fedono”, tradukitaj en Esperanton de Spiros Sarafian.

La terura ekonomia krizo, kiu la lastajn jarojn violente batis Grekujon, devigis la grekan E-movadon perdi multon ankoraŭ, sian lastan, moderan ejon, grandan nombron de membroj, kotizantoj, aktivuloj, amikoj, do, reveni en la staton de la unuaj postmilitaj jaroj. Tamen, nun estas la interreto, kaj tie rifuĝis la greka E-movado, kiu, per sia grandioza greklingva retpaĝo (www.esperanto.gr) kaj du kolektivaj facebook-lokoj daŭrigas la agadon pri la informado de la greka publiko rilate al Esperanto kaj la tutmonda movado kaj atingoj. Samtempe ĝi partoprenas konstante la tutmondan agadon, kontaktante ĉiujn samideanojn kaj ĉeestante al ĉia aktiveco.

Plej lasta atingo de la greka E-movado estas la impona (400-paĝa) libro, “125 jaroj de Esperanto”, eldonita okaze de la ĉi-jara tutmonda festado por la 125 jaroj de esperanto, verkita de la kreinto de la asocia retpaĝo Kostas Kiriakos. Ĉiam celante unue la informadon de la greka publiko pri la afero de Esperanto, ankaŭ tiu ĉi greklingva verko kombinas la plej interesan materialon de la retpaĝo kun la plej freŝaj, allogaj novaĵoj kaj la ĵus lastaj eventoj, atingoj, programoj.

Spiros Sarafian

BALDAU FINIĜAS LA EŬROPAJ KONSULTIĜOJ PRI LA ESTONTO DE EU

Eŭropa Komisiono lanĉis la 9-an de majo tuteŭropan konsultiĝon de civitanoj pri la estonto de EU. Oni devas respondi al dudeko da demandoj kaj kelkajn komenti. La lasta demando rilatas al viaj proponoj por la estonto de EU kaj tie vi povas skribi pri via vizio. La limdato estas la 9-a de septembro. Do, prenu al vi dekkvinon da minutoj kaj serioze traktu la formularon ĉi tie (poste elektu deziratan lingvon):

<http://ec.europa.eu/yourvoice/ipm/forms/dispatch?form=EUCitizenship3&lang=en>

Zlatko Tišljarić

LA JARO DE TIBOR SEKELJ

TIBOR SEKELJ EN HANOJO

Esperantistoj ofte ŝerce diras ke Esperanto ŝajnas esti vere bona kaj forta afero se esperantistoj ĝis nun ne sukcesis detrui ĝin. Ĉi foje mi diru tute inverse: ŝajnas ke Esperanto estas vere bona ideo ĉar dum ĝia relative ne longa historio ĝi sukcesis altiri tiom multe da eksterordinaraj homoj. Tibor Sekelj kaj Ivo Lapenna apartenas certe al tiu nobla grupo. Pro tio estis preskaŭ kortuŝe vidi tiujn du samklubanojn, kaj ne ĉiam samideanojn, denove kunligitajn. Ĉi foje dum la 97-a Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo. Nome la prelego „Tibor Sekelj – la semanto“ okazis lundon, la 30-an de julio en salono Lapenna. Jam en enkondukaj frazoj Judita Rey Hudeček, multe pli juna zagreba samklubanino de Sekelj kaj Lapenna, diris ke ŝi deziras paroli nek pri Tibor verkisto, nek pri

Tibor esploristo, nek pri poligloto, nek pri E-diplomato sed pri Tibor ci-amiko de la mondo, kaj pri homo kiu dum sia tuta vivo semis ideojn kaj agojn kiuj ĝis hodiaŭ fruktas. Multaj landaj asocioj en la mondo rajtas paroli pri „Tibor la nia“, kroata ĉefurbo Zagreb aparte ĉar tie liaj ideoj trovis la plej fekundan grundon.



La prelegon de J.R.H tre trafe pliriĉigis s-ro Ivo Osibov (ankaŭ iama membro de la sama zagreba klubo) per klarigoj pri malsameco de karaktero de Tibor Sekelj kaj Ivo Lapenna kiuj siatempe rezultis per nekunlaboro kaj miskomprenoj. Inter multaj landoj en kiuj Tibor Sekelj aktivis Nepalo havas tre apartan lokon. Sekelj sukcesis ne nur eniri tiam por eksterlandanoj preskaŭ fermitan landon, sed ankaŭ tie fondi E-klubon, skribi libron pri ĝi

kaj postlasi spurojn al ekstermovada vivo. S-ro Bharat Ghimire el Nepalo analizis libron „Nepalo malfermas la pordon“ kaj parolis pri ĝia graveco por Nepalo ĝenerale.

Estis ĝojige audi ke Tibor Sekelj ankaŭ hodiaŭ inspiras homojn je multaj aferoj. Estrarano Amri Wandel prezentis sian ideon konkeri ĉiujn montpintojn kiujn konkeris ankaŭ Tibor Sekelj, kaj tiasence montris fotojn de la de li jam sukcese efektivigitaj grimpadoj. Kvankam ŝi ne estis persone en Hanojo, Spomenka Ŝtimec donis ankaŭ sian kontribuon al UK-programero rilatanta al Tibor Sekelj, Nome, ŝian prelegon okazintan novembre 2011 en Centra Oficejo, tre bone prilaboris s-ro Francisco I. Veuthey. La dokumenta filmo „Tibor Sekelj de Akonkagvo al Unesco“ estas pliriĉigita per unikaj fotoj, mapoj kaj desegnaĵoj. La filmo estis prezentita jaŭdon la 3-an de aŭgusto en la salono Matland.

Judita Rey Hudeček

RENKONTIĜO DE VERKISTOJ DEDIĈITA AL TIBOR SEKELJ

KROATA ESPERANTO-LIGO (esperanto@zg.t-com.hr) kunlabore kun Esperanto-Societo „Trixini“ Hraščina invitas al renkontiĝo de esperantlingvaj verkistoj en vilaĝo Hraščina-Trgovišće en norda Kroatio la 15-an de septembro 2012. La renkontiĝo estas dediĉita al 100-jaroj de Tibor Sekelj.

Programo:

14.30 Saluto de la prezidantino de KEL Judita Rey Hudeček

Pri Tibor Sekelj parolas Zlatko Tišljar (HR),

Heredaĵo de mia edzo Tibor Sekelj. Parolas Erzsebet Sekelj (HU)

Poezias de Tibor Sekelj analizas Zlatoje Martinov (SR)

Franca tradukon de „Kumeŭaŭa –filo de la ĝangalo“ prezentos A. Jaucions (FR)

Kroatan tradukon de „Kumeŭaŭa“ prezentos aktoro Ivan Ožegović

18 h Koncertas Neven Mrzlečki

Spomenka Ŝtimec

SOMERAJ OMAĜOJ AL TIBOR SEKELJ



Dum la 9-a kongreso de EEU en **Galivo** (Irlando, pri Tibor Sekelj kaj ĉefe lia vivfilozofio prelegis Zlatko Tišljár. Ĉeestis kvindeko da kongresanoj.

Fritz Wollenberg faris prelegon pri Tibor Sekelj dum Komuna Dana-Pola-Germana Esperanto-Kongreso en **Berlino** en majo. En la gazeto de la Kulturasocio Prenzlauer Berg r. A. „mittendrin“ 3/2012, paĝoj 6-7 aperis germanlingva artikolo pri Sekelj kaj nia Sekelj-omaĝo.

Zlatko Tišljár

JUBILEO DE LA 125 JAROJ DE ESPERANTO SOLENE EN WAĞROWIEC



Dum la 3-a Grandpolia Esperanto-Somero en Wağrowiec (Pollando), plej gravaj eventoj ligitaj kun oficiala celebrado de la Jubileo okazis la 2-an de julio 2012.

Urbestro de Wağrowiec mag. inĝ. Stanisław Wilczyński kun akompano de Franciszek Witucki – la Prezidanto de Pola Asocio Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE-PL) kaj Stanisław Rynduch – la Sekretario de Eŭropa EDE Federacio, kune malkovris (inaŭguris) la unuan ZEO-on en tiu urbo - la memoran ŝtonegon (6-tunan) kun alkröita

blank-marmora inform-tabulo, financita (donacita) de Stanisław Rynduch okaze de la Jubileo de 125 jaroj de Esperanto. Ĉe la ŝtonego bele deklamis, okjara Olga Goncerzewicz, la versaĵon: 'Estas mi esperantisto' verkita de hungara poeto Julio Baghy.



Sekve, ĉe la muro de la domego en kiu situas la Esperanta Kultur-Centro, estis malkovrita tabulo de la EDE-PL – sidejo (la dua ZEO). Poste la skvaro antaŭ la domego estis solene alnomita: skvaro de Ludoviko Zamenhof (la tria ZEO).

La tri gravaj jubileaj eventoj ekestis danke al rimarkinda apogo de lokaj aŭtoritatoj de Wağrowiec urbo kaj distrikto. Post la oficiala parto, en lerneja aŭlo, estis kontinuata la solenaĵo kiun komencis Franciszek Witucki

EDE-PL – prezidanto, legante salutvortojn al 3-a GES flanke de: Jerzy Wenderlich - Vicprezidanto de Pola Sejmo kaj Boĵidar Leonov – Prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio. Poste li eldiris nomojn de esperantistoj distingitaj de Bronisław Komorowski – Prezidento de Respubliko Pollando, laŭ iniciato de EDE-PL – Estraro:

Józef GOLEC – per Kavalira Kruco de la Ordeno de Merito por Respubliko Pollando; Ireneusz WILCZYŃSKI – per Ora Kruco de Merito; Edward JAŚKIEWICZ – per Ora Kruco de Merito kaj Jerzy Antoni WALASZEK – per Ora Kruco de Merito.

Krome Józef Golec honorigita jam estis per Honora Civitaneco de la urbo Cieszyn (Teŝino).

Urbestro de Wağrowiec, en sia parolado, interalie, esprimis kontenton pro la ekorganizo de la sekva GES-o, samtempe bonveninte kaj salutinte la partoprenantojn. Post la salutado sekvis arta programo kiun komencis sekva deklamado de Olga Goncerzewicz, kiu esperantlingve prezentis versaĵon: 'La kvar sezonoj'. La ĉefa arta programero de la solenaĵo estis monologo de Mario Migliucci "Doktoro Esperanto" kortuŝe prezentita fare de la loka esperantistino Irena Grochowska. En la arta programo prezentiĝis ankaŭ: Instruista Koruso gvidata de Tomasz Kotwica, wağrowiec'a Bruss Quintet kaj Saksofona Kvarteto de Ŝtata Muziklernejo en Wağrowiec kaj Grylewianki-ensemblo. Vokalista minirecitalo per akapela muziko ('a cappella') de Antoni Walaszek, nomata 'Verda knabo el Sosnowiec, finis la artan programon.

Eduardo Kozyra

NOVAJ PROJEKTOJ DE ESPERANTISTOJ KIUJN FINANCAS EŬROPA KOMISIONO

1. COMENIUS: Herzberg/Harz- Györ-Mazaradelvalo

Kun granda ĝojo mi informas vin pri nova, sukcesa Comenius-projekto! La projekto kun la titolo "Vizito de la loka kastelo al la Eŭropa Domo - A Guided Tour from the Local Castle to the European House" ricevis aprobon!

Ĝi daŭros dum 2 jaroj inter 2012-2014 inter mezlernejoj en Herzberg am Harz en Germanio, Györ en Hungario kaj Mazaradelvalo en Italio. Kiel kvara partnero povos aldoniĝi lernejo el Zagreb, ili estas momente en atendolisto.

Estas bela agnosko por la kvalite ellaborita projekto formulita de Zsafia Korody kaj Ewa Kukielka el Herzberg, por kiu ni utiligis niajn spertojn el antaŭa sukcesa projekto inter 2008-2010. Ni antaŭĝojas kunlabori kun niaj partneroj kaj volonte raportos pri la eventoj kaj rezultoj.

Zsafia Korody

2. COMENIUS: BG-RO-DE-LT-SE-IT

En la projekto “La diversaj profesioj – transformi la provokojn en eblecon realigi siajn revojn” partoprenas lernejoj de: Bulgario (Mariana Gencheva – lernejo “Canko Cerkovski”), Rumanio (Mariana kaj Dimitru Berariu – liceo “Ana Ipatescu”), Germanio (Christof Krick – Gimnasium Winterberg und Medebach), Litovio (Grazina Opulskiene – Mazeikiu Merkelio Rackausko gimnazija), Svedio (Folke Wedlin – Lerums Gimnazium) kaj Italio (Gaspero Domenichini – Instituto statale di istruzione secondaria superior della piana di Lucca ITCG Benedetti ls Majorana).

Ni organizos kvar laborrenkontiĝojn (en Bulgario – oktobre 2012, Italio – majo 2013, Germanio – oktobre 2013 kaj Rumanio – majo 2014). La partopreno en la projekto donos al la gejunuloj eblecon orientiĝi kaj diagnozi la interesojn de sia personeco, pritaksi siajn eblecojn kaj kompreni la motivojn por la elekto de siaj profesioj. Dum la realigo de la projekto la gejunuloj havos eblecon renkontiĝi kun samaĝuloj de aliaj EU-landoj; ili konatiĝos kun ilia lingvo kaj kulturo, komprenos la neceson gardi la lingvan diversecon en Eŭropo kaj ricevos sciojn rilate al la edukaj, profesiaj kaj ekonomiaj eblecoj proponitaj de Unuiĝinta Eŭropo. Ni atingos tion per la uzado de diversaj interaktivaj metodoj kaj per la uzado de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto, kiu donos egalajn eblecojn de komunikado al ĉiuj partoprenantaj gejunuloj kaj al iliaj gvidantoj.

Mariana Gencheva

3. GRUNDTVIG: MAZARA DEL VALLO

Itala E-Federacio kaj Kosmo Strategio Ltd. ĝoje anoncas ke Eŭropa Unio subtenos plian E-instruiston en Mazara del Vallo, danke al la programo Grundtvig Vizitoj kaj Interŝanĝoj. Esperantisto el Francio ricevos stipendion por translokiĝi al Mazara kaj kunlabori kun la tieaj agadoj de IEF dum kvin semajnoj, en aŭtuno. Grava sukceso, kiu aldoniĝas al la financado de esperantisto el Belgio por instrui dum tri monatoj, anoncita antaŭ kelkaj semajnoj.

La rilatoj inter Esperanto kaj Mazara del Vallo pli kaj pli intensiĝas. Aldo Grassini, prezidanto de IEF, tiel komentas: "Ni ĵus ricevis informon ke lernejo en Mazara del Vallo partoprenos en Esperantista Comenius-Partnerado, financita de EU. Plie, du instruistoj estos pagitaj de EU por helpi nin en nia agado en tiu urbeto, per la programoj Grundtvig Asistado kaj Grundtvig Vizitoj kaj Interŝanĝoj.

La verda vojo de IEF bone kuniras kun la blua Eŭropa vojo."

Francesco Maurelli

ESPERANTO EN VIENAJ METROOSTACIOJ



"Infoscreen" estas sistemo, kiu per grandaj ekranoj en metroo-stacioj montras video-programon kun novaĵoj, kulturaj informoj, veter-prognozoj kaj varbado. Ekde la 17-a de julio 2012 videblas informo kun tiu ĉi enhavo: 1-a bildo kun la jubilea simbolo kaj teksto "125 jaroj de Esperanto - Saluton" / 2- a bildo kun foto de Zamenhof kaj la teksto "Tiel oni salutas en la pont-lingvo kreita de Ludoviko Lazaro Zamenhof. Ĝi interligas homojn de ĉiuj patrinaj lingvoj. Ankaŭ en Vieno ekzistas Esperanto-asocio".

Uwe Stecher

5-A SOMERA ESPERANTO-STUDADO (SES)

En slovaka urbo Nitra, inter la 21a kaj la 29a de julio, okazis la 5a Somera Esperanto-Studado (SES) organizita de Edukado@Interreto (E@I, la organizo kiu ankaŭ respondecas pri la retpaĝaro lernu.net). En bonega etoso kaj sufiĉe varma vetero, 250 partoprenantoj el 23 landoj grupiĝis en 10 klasĉambrojn laŭ 6 niveloj (A1, A2, B1, B2, C1, C2). Ankaŭ okazis la kurso por instruantoj *Flugiloj de malfacila vento* (kiun mi ĉeestis) gvidita de Xosé Conde kaj Konstantin Tichomorov.




Kutime, en tiu aranĝo, matene, la lernantoj ĉeestas la kursojn, kie spertaj instruistoj profesie kaj altnivele helpas ilin plibonigi siajn lingvajn kapablojn en malstreĉa sed laborema etoso. Post la komuna tagmanĝado (kie pli gravas la interkonatiĝo ol la manĝaĵo mem), okazas prelegoj, unuhoraj kursoj pri ĉio, ekskursoj, paroligaj rondoj por komencantoj, masaĝoj, ludoj, ĵonglado, muzikludado kaj dancado. Ankaŭ eblas sportumi aŭ promeni tra la bela urbo. Vespermanĝinte, la homoj renkontiĝas en la salono, kie okazas koncertoj, teatraĵoj, konkursoj kaj la nemalhavebla *Internacia Vespero*. Nokte, oni bierumas, dancas kaj bonetose malkrokodilas en la apuda trinkejo. La malpli bruemaj homoj renkontiĝas en la gufujo por saĝe konversacii, deklami poemojn aŭ ludi trankvilan muzikon pere de malalkoholaj trinkaĵoj. En ĉi tiu aranĝo, mi havis la ŝancon prelegi eĉ dufoje. Unue mi parolis pri muziko (mia fako), kaj poste mi prezentis novan helpilon por lernado kaj instruado de Esperanto, kiun mi esperas prezenti en Ipernity iam.

Petro Baláž, la ĉefa respondeculo de SES kaj E@I, anoncis, ke la venonta SES okazos en la urbo Martin, ankaŭ en Slovakio. La evoluo de tiu aranĝo montriĝas tre sukcesa, ĉar en la unuaj jaroj estis proksimume 100 partoprenantoj, poste tiu kvanto duobliĝis, kaj ĉi jare, ĝi jam atingis la elstaran kvanton de 250 SESanoj kaj 14 instruistoj.

Oni povas vidi pli da fotoj [ĉi tie](#).

Viktoro Solé

GREZIJONO: ALTERNATIVA SEMAJNO KUN VERDPOLITIKA SEMINARIO DE AVE



Inter la 28-a de julio kaj 4-a de aŭgusto okazis 2 niveloj da lingvokursoj, amenditaj per kantado kaj skeĉoj. Kadre de la Verd-Politika Seminario de AVE partoprenis deko da homoj.

Ni diskutis ekologiajn kaj demokratiajn temojn. La programo estas trovebla ĉi tie: <http://gresillon.org/s2>. Detalojn kaj ligojn al la koncernaj dokumentoj vi trovas en <http://www.verduloj.org/energio.htm> (sub "100 Argumentoj ...")

Marco van Hulten klarigis la influon de la oceanoj al la tutmonda klimato kaj rakontis pri eksperimento fekundigi la oceanon per fero por ke pli da organismoj povus vivi tie, kun la dezirata konsekvenco ke ili kaptos karbondioksidon - por redukti la forcejan efikon. Evidente tiu eksperimento montris tro kompleksan rezulton, kial ĝi kaj aliaj geo-inĝenieradaj planoj povas havi negativajn konsekvencojn.

Prelego pri plastaĵoj estas trovebla ĉe: <http://www.verduloj.org/dokument.htm> (sub "Ekologio, Sano, Kemio").

Marie-Therese Lloancy prezentis la libron de André Cazetian "Urboj por ŝanĝi la mondon", kion ŝi tradukis en Esperanton. La aŭtoro estis urbestro de Mourenx Nova-Urbo (fondita en 1956). Unue li priskribas la mastrumadon de tiu ek-funkcianta urbo (pro ekspluato da tergaso) en rekta kunlaboro kun la novaj enloĝantoj, sendepende de ilia nacieco. Due li priskribas la kondiĉojn por Partoprena Demokratio kiu nepre necesas por atingi socialan kunvivadan pacon kaj ankaŭ ekologian daŭropovecon, kontraste al la tendencoj de la nov-liberalismo, kies sola celo estas la maksimuma profito. Ĝi estas tre bone legebla.

Michael Leibman prelegis en 3 sesioj pri la ekonomiaj principoj kaj krizoj de la lastaj du jarcentoj; kaj prezentis kiel alternativon la Verdan Novan Konsenton "Green New Deal": strebi ne al daŭra kreskado, sed al pli stabile balancita ekonomio, kie tamen evoluo povos ekflori. La homa populacio povas esti stabila se ĉiuj homoj spertas socialan egalecon t.s. kiam la diferenco inter la plej riĉaj kaj malriĉaj estas malgranda.

Marco van Hulten informis pri la programo Liquid-Feedback kiun uzas la Piratpartio por rekte ligi la volon de la civitanoj kun la agado de iliaj delegitoj; pli en Esperanto: <http://piratpartio.org>.

Manfred Westermayer

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de aŭgusto 2012

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Micheál D. Ó hUiginn, Spiros Sarafian, Judita Rey Hudeček, Spomenka Štimec, Eduardo Kozyra, Zsofia Korody, Mariana Genêva, Francesco Maurelli, Uwe Stecher, Viktoro Solé, Manfred Westermayer

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

